

# LA JUNIA VIVO



## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.  
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

### LA PLEJ MALGAJA MOMENTO EN MIA VIVO.

Estis en vintro. Ĉi tiu tago estis simila al aliaj vintraj tagoj. Mi estis tiam 8-jara kaj mi loĝis en vilaĝo, ĉar en Gdynia estis „Deutsches Reich”. En la vilaĝo estis por mi tre malgaje. Mi ne havis kamaradinojn kaj en tiu jaro mi ne povis viziti lernejon, ĉar mi ne havis mantelon. En la dika dorsotuko, kiun mi ricevis de mia avino, mi staris ĉe la vojo kaj mi lekis neĝon. Ĉu vi memoras? Kiam vi pasis, mi ĵetis neĝon sur vin kaj vi reĵetis ..... Tio estis nia konatiĝo. De tiu momento mi havis vin, mi havis karan amikindon. Vi loĝis proksime al mi. Vi komencis viziti min kaj ni amuzis nin duope en la ĉambro. La plej agrablaj momentoj estis vespere, kiam mia avino post la ĉiutaga laboro havis liberan tempon kaj ŝi rakontis al ni tiujn ĉarmajn, neforgeseblajn flablojn, kiuj tiom ravas infanojn. Kiom feliĉaj ni estis!


Poste estis printempo kaj somero. Ĉu vi memoras niajn amuzojn sur la monteto? Kiom da floroj kaj arboj estis tie! Kiel ĉarme kantis birdetoj, malgraŭ la milito!

Milito? Ni ne memoris, ke estas milito. Ĝi ja estis malproksima kaj ni estis infanoj .....

Sur tiu monteto (kiu ŝajnis al ni granda monto) estis strangaj objektoj: sur granda, maljuna kverko loĝis malgrandaj hometoj.

Vere, ĉiam, vespere, ni vidis ilin. Mi bone memoras. Poste estis aŭtuno kaj en tiu tempo la germanoj komencis forigi judojn. Vi vizitis min jam malofte. Mi atendis vin kun malpacienco: mi ja havis novan robon por nia pupo. Kaj kiam vi malfrue en la vespero time venis en la ĉambron, via vizaĝo estis pala kaj laca. Vi tre timis, mia kara amikino. Vi loĝis en arbaro, kun via familio. Vi deziris panon. Ni forte kisis unu la alian, kiam vi foriris. Mi ne sciis, ke ni vidis unu la alian la lastan fojon. Post unu semajno mi aŭdis, ke vi estis pafita de germana soldato. Mi ne skribos pri mia ĉagreno, mi skribas nur, ke la aŭtuno estis bela, la milito estis malproksima, sed mi perdis mian infanecon, kvankam mi ankoraŭ estis infano.

Danuta Bukowska (17-j.), lernantino en liceo de Belaj Artoj, Gdynia, Polujo.



Silueto de Konstanz.

## KONSTANZ,

**la malnova regna kaj episkopa urbo apud Bodensee kaj Rejno, gastiganta urbo de la TJO-Kunveno en 1950.**

Kiam la kurboriĉa kaj multatunela fervoja linio de Nigra Arbaro estas transpasinta je pli ol 800 m da alteco la montaron kaj trakurinta la altebenaĵon „Baar”, tiam baldaŭ malfermiĝas, inter la bazaltkegloj de la „Hegau”-pejzaĝo, la unua rigardo al la vasteco de la lago Bodensee.


Tiu „Svaba Maro” ne estas lageto, ĉar la tuta homaro trovas spacon sur ĝia surfaco. La Eiffelturo, metite en la profundon de la lago, ĝuste ankoraŭ montrus sian pinton.

En tri partoj disfalas la lago kaj en la koro de tiu malseka trifolio kuŝas Konstanz, urbo, kie la modernismo ne kapablis forpuŝi la heredaĵon de pitoreska pasinteco, elirpunkto de la plej ravaj ekskursoj sur la lago kaj riverego.

Ekzistas en Germanujo malmultaj pejzaĝoj, kiuj povas konkurenci la ĉarmojn de la Bodensee-baseno. Dum klaraj tagoj la tuta ĉeno de alpaj moŝtoj kaj iliaj anaroj, regitaj de la glacioŝirmita estaĵo de Säntis, respegulas sin en la bluaj akvoj de la lago. En la okcidento abundas la fieraj pintoj de la Vorarlberg-aj Alpoj ĝis la lagobordo, kies randojn akompanas ĉe la aliaj flankoj vino-kaj fruktoriĉa pejzaĝa ĝardeno.

Meze de tiu gaja, ŝanĝiĝema pejzaĝo, en tiu fekunda, dia ĝardeno, kuŝas Konstanz. La teruraĵoj de la milito favore preterpasis la urbon. Troviĝas en ĝi ankoraŭ la malnova katedralo, la preĝejo de la iam plej granda germana eparkio. Netuŝita restis la moŝta konstruaĵo de la malnova aĉetodomo, kiu kontribuas al la silueto de Konstanz per la speciala formo de sia tegmento. En tiu „Konzil“ el la 14-a jarcento kunvenis en la jaroj 1414-1418 dum la granda koncilio la konklavo por efektiviĝi la solan papo-elekton, kiu okazis sur germana tero.

Salutas la alvenanten vizitanton ankoraŭ la luksa insula hotelo



Centro de Konstanz.

kun sia unike bela klostro, iama monaĥejo de la dominikanoj kaj naskiĝloko de grafo Zeppelin. Sed kiu volas citi ilin ĉiujn, la ŝtonajn monumentojn de la malnova regno kaj pra-malnova episkopa urbo, la ravan Renesanco-urbdomon, la defend-pordegojn kaj angulturojn, la hejmajn stratetojn kaj angulojn, plenajn de vera romantiko?

Malgraŭ sia honora historio Konstanz estas vivoplena urbo, en kiu ĉiu vizitanto sentas sin bone. Speciale dum la somera sezono la alfludo de fremduloj el ĉiuj landoj neniam ĉesas kaj disvolviĝas

sub la maljunaj arbegoj de la urba parko, sur la teraso de la insula hotelo aŭ sur la lagostrato, unu el la plej belaj kaj indaj bordpromenejoj de Eŭropo, kvazaŭ internacia vivo kaj farado. Depost la tagoj de la granda konsilantaro, kiam la rigardoj de la tuta Kristanaro estis direktitaj al Konstanz, tiu klasika, fabelspeca urbo apud Bodensee kaj Rejno ja ĉiam estis preferita kongresejo. Tion ĝi dankas ne nur al sia situacio, sed ankaŭ al la fameco kaj la respektindeco de sia tradicia hotela industrio. Bonegaj estas la fiŝ-specialaĵoj kaj la vinoj.

Estas daŭrigota.

### **Penso por la bestaro (responde al la artikolo en LJV n-ro 143-a).**

Mi multe dankas vin, kiu pensas pri la bestoj kaj diras al la legantoj de nia bela revuo, ke ili kompatu niajn malsuperajn fratojn.

Ĉu vi permesas al mi aldoni la belan penson de BUDAO, la konata majstro hinda, kiu profunde amis ĉiujn kreitaĵojn kaj ordonis al siaj anoj: „Anstataŭ oferbuĉi bestojn, ellasu ilin! Ili trovu herberojn, akvon kaj freŝajn ventojn!”

Por pravigi la mortigadon de bestoj oni diras, ke la homa dentaro estas farita por tranĉi la viandon. Mi kredas, ke tio estas grava eraro, ĉar la dentoj ne necesas por nutri sin. Mi opinias pli bone atenti la longecon de la intestoj.

Nu, kion ni vidos?

La herbomanĝantaj bestoj havas tre longan inteston. La frukto-manĝantaj havas mezan inteston; la viandomanĝantaj havas nur tre mallongan inteston.

Kie loki la homojn?

La scienculoj diras tuj: la homoj havas inteston ne longan, ne mallongan, do mezan; tial mi diras, ke la homoj estas frukto-manĝaj.

Oni povus ankoraŭ diskuti pri la sekrecioj de la digestaj organoj kaj pri la malbona influo de vianda nutraĵo kontraŭ la mildeco de karaktero k.t.p.

Mi asertas, ke, escepte en okazo de forta devigo, la homoj ne rajtas memvole mortigi vivulon.

F. J. Henry (Blida, Alĝerio).

---

Multaj ankoraŭ ne pagis sian kotizon por 1950. Al la nederlandanoj ni dume sendis poŝtkvitancojn, do ili bonvolu atendi la prezentadon. Eksterlandanoj pagu al sia landa ĉefperanto. Se ne — ĉi tiu n-ro estos la lasta, kiun ili ricevos.

## Delegito-Servo kaj ĝia efiko.

Radio-amatoro en Bratislava (Ĉeĥoslovakujo) estis en embaraso: lia radiolampo rompiĝis kaj do samtempe lia kontakto kun la radio-mondo.

Kion fari? Ĉie en propra lando ne estis havebla nova Philips-D.K. 21-lampo kaj mendo al la fabriko mem ne havus efikon, ĉar pago el Ĉeĥoslovakujo al Nederlando ne estas ebla.

Kiel trovi solvon? Nu, la radio-amatoro estis ankaŭ Esperantisto kaj membro de la Universala Esperanto-Asocio, kiu havas en multaj landoj delegitojn pretajn fari utilajn servojn al gesamideanoj kie ajn en la mondo. Li trafolumis la jarlibron de tiu Asocio por serĉi adreson en la lando, kie troviĝas la fabrikoj de Philips, kaj li trovis adreson de fakdelegito pri radio.


Tuj li skribis Esperanto-letereton al tiu ne-konata samideano en Nederlando, por kiu estis simpla afero mendi lampon de la indikita speco. Pleniginte tutan serion da formularoj li sukcesis translimigi la delikatan, deziregatan objekton en lada skatoleteto.

Baldaŭ konfirmis letero el Bratislava la bonan ricevon de la lampo. Dankema koro ravita! Parencoj kaj gekonatoj, tre frapitaj de la utilo de komuna interlingvo kaj internaciaj kontaktoj bonspecaj, esprimis la deziron lerni Esperanton.

Philips kaj Esperanto riparis rompiĝintan kontakton internacian malgraŭ lingvaj, politikaj kaj doganaj limoj kaj feraj kurtenoj.

Do tamen restas ebloj helpi unu la alian.

Komunikis: S. S. de Jong Dzn., U.E.A.-delegito, fakdelegito pri la frisa lingvo, Tjerkwerd (Fr.), Nederlando.



### I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

En n-ro 139 (aŭg. '49) ni presis la koncepton de nia konstitucio. Nia fakkunveno akceptis ĝin kia ĝi estis formulita. Do ne necesas denove menciigi ĝin. Nur kelkaj negravaj ŝanĝoj: **Punkto 4-a**, lasta linio: La komitato kunvenu unu fojon jare ..... estos: La komitato kunvenu **almenaŭ** unu fojon jare .....

**Punkto 5-a**, unua linio: forstreku: „kiu dum la jaro funkciigu la Ligon. La” ..... kaj anstataŭigu per „konsistantan el” .....

**Punkto 9-a**: b.v. aldoni post U.E.A.: „kaj estu preta akcepti kunlaboron kun ĉiuj aliaj internaciaj organizaĵoj.”

Pri la diversaj aranĝoj (precipe punkto 8-a, financa bazo) ni diskutos dum nia fakokunveno en Parizo 1950. Sendu jam nun viajn sugestojn al nia Centra Oficejo.

La listo de niaj reprezentantoj, pri kiu ni parolis en la sept. n-ro, ankoraŭ ne estas tute preta. Baldaŭ ni publikigos ĝin.

Nia kunlaboro kun UEA estas fakto. ILEI kaj UEA akceptis jenan kontrakton:

1. La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj pagos ĉiujare la sumon, kiu estas fiksita de la komitato de Universala Esperanto-Asocio kiel asocia pago.

2. La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj faros sian eblon instigi siajn membrojn aliĝi al Universala Esperanto-Asocio kiel individuaj membroj.

3. Universala Esperanto-Asocio presigos en sia Jarlibro informon pri la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj laŭeble presigos en sia gazeto komunikaĵojn pri tiu Asocio.

4. La du organizaĵoj faros sian eblon helpi unu al la alia rilate komunajn celojn.

5. La nuna kontrakto ne plu validos:

- a. okaze de nepago de la kotizo laŭ paragrafo unua aŭ
- b. se unu el la kontraktintaj partioj deziras ne daŭrigi ĝin.

Tiuokaze trimonata averto estos necesa.

Aldone al punkto 1-a: la „asocia pago” sumiĝas £ 1-1-0.

## La presarto en la lernejo.

Antaŭ la mondmilito miaj gelernantoj ofte korespondis kun infanoj en Nederlando kaj kelkfoje esperantlingve kun eksterlandanoj.

Bedaŭrinde mi ĉiam konstatis, ke la leteroj enhavis nur naivaĵojn pri la gepatroj, gefratoj, la hundoj kaj la katoj.

Post la tria letero la infanoj ne plu sciis, kion ili skribu, kaj kiam la infanoj forlasis la lernejon, la korespondado ĉesis.

En 1948 mi ricevis de kolego Lentaigñe el Francujo broŝuron pri la avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la individua korespondado kaj pri la presarto en la lernejo.

Mi ne tute komprenis, kion li celis, kaj al presarto en la lernejo mi ne kredis. Hazarde mi aŭdis pri kolego Freinet kaj legis lian „Naissance d'une pédagogie populaire”.

Mi mendis „Freinet presileton” kaj nova mondo malfermiĝis por mi.

La ebloj ŝajnis senlimaj. La gelernantoj de mia lernejo, ankaŭ la plej junaj, verkis siajn tekstojn tute libere kaj ne pensu, ke la rakontoj estas malbonaj. Kontraŭe! La plenkreskuloj nun ne verkas por infanoj, sed infanoj por infanoj.

Post tio la samaj infanoj presis siajn verkaĵojn per „la presileto” kaj la rezultato estas admirinda. Infanoj sesjaraj kompostas siajn plumbajn literojn en la kompostilojn kaj faras la presprovon. Ili mem serĉas la preserarojn kaj finfine ili pretigas siajn libretojn.

Neniu, kiu ne mem vidis la kompostantajn infanojn, povas scii ilian laboremon.

Ili presas tiom da libretoj, kiom ili bezonas. Post la presado venas la interŝanĝo. Ili sendas sian laboron al aliaj lernejoj kaj eĉ eksterlanden. Ili ricevas lernejajn gazetojn el Francujo, Svedujo k.t.p.

Skribu al ni kaj ankaŭ vi ricevos nian kristnasknumeron kun kvar internaciaj paĝoj.

Nia adreso estas: C. Geurts, lernejestro, Edam, Nederlando.

### Karaj Lernejanaj.

Nun jam estas 1950 kaj mi deziras al vi ĉiuj multan bonon en la nova jaro!

Ĉu vi havis agrablan ferion? Certe ĝi pasis tro rapide! Jes, sed ĝi tamen donis al ni novan energion! Kaj — en nova jaro ni ĉiam komencas kun bonaj intencoj, ĉu ne? Ĉu vi do povus promesi, ke vi diligente studos Esperanton? Ĉu mi povas atendi de vi interesajn verkaĵojn? Ankaŭ belaj desegnaĵoj estos bonvenaj!

En la antaŭa numero mi skribis, ke nur s-ro Goodes respondis pri naciaj festoj. Feliĉe — poste sekvis aliaj el Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Usono, Kanariaj Insuloj. Do el tre diversaj partoj da la mondo. Al ĉiuj multan dankon! Ne eblas enpresigi ĉiujn verkaĵojn en ĉi tiu numero. Ni nun elektis la verkaĵetojn „Kristnasko en Anglujo” kaj la „Festo de la Reĝoj sur la Kanariaj-Insuloj”.

Kiam alproksimiĝos decembro 1950, ni enpresigos la aliajn verkaĵojn. Tiam vi legos, kiel oni festas „Sanktan Nikolaon” en Ĉeĥoslovakujo kaj Kristnaskon en Usono.

N. K.

### Por matematikemuloj.


Se unu briko pezas 1 kilogramon + duonan brikon, kiom pezas unu briko? (La solvon vi trovos en venonta n-ro).

Petro, Belgujo.

---

Varbu kaj verku por „La Juna Vivo”! Mendu viajn esperantaĵojn ĉe la TJO-Libro-Servo: Voorhaven 80, Edam, Nederlando.

## NIA VERKILO.



1.

Nun vi povas „verki” tutan historion: **En la somero.**

Vi povas uzi la vortojn: ĝardeno, ĝardenisto, rastilo, fosilo, heĝo, vojeto, legomoj, terpomoj, rasti, fosi, kulturi, fumi.



2.

### Sur la kampo.

muelejo, nuboj, domoj, arboj, herbo, akvo.  
Ĉu homoj? Ĉu birdoj?

Mi ricevis de kelkaj gejunuloj frazojn, kiujn ili verkis ĉe la bildoj de „Nia Verkilo”. Speciale al Juliette Juillard, Pontarlier (Francujo), laŭdon pro ŝiaj tre bonaj frazoj.

Al D. Browse, Thames Ditton (Anglujo), mi rekomendas: verku nur mallongajn frazojn. Verki du mallongajn estas pli bone ol unu tre longan. Ĉu vi ankoraŭ sendos al ni kelkajn?

Kaj ..... kiuj sekvos? Sendu viajn frazojn rekte al tiu, kiu prizorgas la rubrikon „Nia Verkilo”, do al: s-ro P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Nederlando.



## Kristnasko en Anglujo.

La junaj infanoj en Anglujo kredas, ke viro venas en la domon tra la kamentubo. Lia nomo estas „Patro de la Kristnasko”. Li metas ludilojn en ŝtrumpon, kiun la infanoj ligas sur siaj litoj.

La infanoj kredas, ke li loĝas apud la Norda Poluso. Liaj vestoj estas ruĝaj kaj blankaj. Sur sia dorso li portas grandegan sakon. En tiu sako estas ludiloj por ĉiuj infanoj. Li vojaĝas de unu loko al alia per glitveturilo.

Verkaĵo de Bridget Dennely (lernantino), Northfield, Anglujo.

## La festo de la Reĝoj.

Festo, iom simila al la nederlanda de Sankta Nikolao, ekzistas ankaŭ en Hispanujo. Sed sub alia nomo kaj je alia dato.

Nu, kvankam mi ne estas lerneĵano, mi tamen plezure verkas ion pri tiu festo por la tutmondaj esperantistaj geknaboj.

Laŭ la hispana moro malgrandaj, obeemaj infanoj ricevas de la reĝoj (kaj ili venas ja unu fojon ĉiujare) multajn kaj belajn donacojn. Ju pli bonkondutaj estis la etuloj post la lasta vizito de la reĝoj, des pli belajn donacojn ili ricevas.

Laŭ la rakonto en la evangelio de Marko ĉi tiuj reĝoj estas tri saĝuloj. Ili venis el al oriento al Jerusalemo por vidi kaj adori la dian infanon kaj oferi al li oron, elibanon kaj mirhon.

En Hispanujo oni nomas la saĝulojn simple reĝoj kaj ankaŭ reĝoj-magoj (tio estas reĝoj-saĝuloj).

La tri reĝoj rajdas sur blankaj dromedaroj. Unu el ili estas el Egiptujo aŭ Etiopujo. Li estas negro kun densa kaj krispa hararo. Lia nomo estas Baltasaro. Alia venas el Arabujo aŭ Hindujo. Li nomiĝas Melĉoro kaj lia koloro similas al cinamo aŭ kupro. La tria estas el Helenujo, t.e. pra-Grekujo. Lia haŭto estas blanka, la haroj blondaj, bluaj la okuloj kaj blanka la barbo. Lia nomo estas Gasparo.

La festo de la tri reĝoj okazas je la 6-a de januaro. Antaŭ ol la infanoj enlitiĝas je la 5-a de januaro, ili metas siajn ŝuojn ĉe fenestro aŭ balkono. Tie la reĝoj ja facile povas vidi ilin, kiam ili pasas por disdoni donacojn al infanoj de ĉiuj mondpartoj.

Antaŭe oni konis la feston nur en la urboj. Nun ĝi atingis ankaŭ la vilaĝojn kaj kampdomojn. En la urboj de Kanarioj oni povas vidi la tri reĝojn-saĝulojn sur la dromedaroj<sup>1)</sup>, kaj kun brilegaj

<sup>1)</sup> En la urboj de hispanujo ofte ĉevaloj anstataŭas dromedarojn.

manteloj kaj kronoj kaj kun kestoj plenaj de donacoj. Rave la infanoj rigardas al tio kaj tiam tuj iras al la litoj. Kutime la reĝoj ja donas la donacojn nur kiam la infanoj dormas.

Frue en la mateno la knabetoj ellitiĝas kaj kuras al la ŝuoj: jen la tago de la feliĉo! En la ŝuoj kaj apud ili estas la donacoj, ĉefe ludiloj.

Eĉ al plenaĝuloj la reĝoj ofte donas donacojn. Tiu kutimo disvastiĝas ĉiujare.

Post Kristnasko, ĝis la 5-a de januaro, ĉiuj butikoj estas plenplenaj de objektoj, kiujn oni povas donaci. La infanoj iras kun siaj gepatroj por rigardi ilin. Poste la etuloj skribas leterojn al la reĝoj, kun siaj petoj. Kutime la patroj konsilas al la infanoj ne peti tro multe, ĉar tiam la reĝoj povus fariĝi koleraĵoj kaj doni nenion. En multaj butikoj estas leterkestoj, kie la infanoj povas meti siajn leterojn.

Post forpaso de multaj jaroj infanoj fariĝas gepatroj kaj festas la venon de la tri reĝoj-saĝuloj kun siaj idoj. Tio vekas memorojn pri pli fruaj jaroj, pri la sinsekvaj festadoj. Ĝi estas aromo, kiu daŭre parfumas la rememorojn .....<sup>2)</sup>

J. Régulo Pérez, Kanariaj Insuloj.

### Nederlanda salo.

En oktobro ni verkis rakonton pri nederlanda salo. Pri tiu rakonto ni ricevis belan leteron de f-ino Kalina Yvette (Pontarlier, Francujo).

Ŝi skribis: „En nia regiono oni same produktas salon kiel en Nederlando, ĉar ni loĝas malproksime de la maro. Mi tamen opinias, ke vi en via lando pli facile povus pumpi marakvon rekte el la maro kaj vaporigi ĝin. Estas longa kaj multekosta maniero trabori la teron kaj meti en ĝin longan, feran tubon. Mi kredas, ke estas alia motivo por produkti salon en tiu maniero. Ĉu vi povas klarigi tion pli bone?”

Ni montris tiun demandon al nia instruisto kaj li donis jenan respondon:

„Pumpi marakvon rekte el la maro kaj tiam vaporigi ĝin, kostus tro multe da varmo kaj la salo iĝus tro multekosta. 1 m<sup>3</sup> da marakvo enhavas 25 kilogramojn da salo kaj 1 m<sup>3</sup> da el la tero pumpita peklakvo 300 kg.”

<sup>2)</sup> Famaj pentristoj kaj verkistoj ĉerpis temojn por siaj verkoj el tiuj festoj. Famaj pentraĵoj montras la „Rajdadon de la reĝoj”. Aliaj, pli kortuŝaj, esprimas la „songojn de la etuloj dum la nokto de la reĝoj”.

Ni dankas vin pro via letero kaj esperas, ke vi nun estas kontenta. Ni demandas ankaŭ al niaj geamikoj, kie ajn sur la tero: „Kiel oni gajnas salon en via lando?”

La infanoj de la elementa lernejo en Edam, Ned.

## KONKURSRUBRIKO.

### Raportoj:

1. (prokrastita de la novembra n-ro): Mi ne ricevis multe da provoj kaj kelkaj novuloj **ne bone legis la regulojn**. La premion gajnas **June Childs** (Tinker's Farm, Britujo).

1. Mi ricevis 20 provojn el Britujo, 6 el Nederlando kaj 1 el Ĉeĥoslovakujo. Ili estis bonaj kaj mi gratulas ĉiujn. **Marion de la Houssaye** en Hilversum (Ned.) gajnas la premion.

A. B.

Pri konkursoj 2 kaj 3 ni ne ricevis raportojn. — Red.

### Novaj konkursoj.

1. (ĝis unujara lernado): „**FELIĈAN NOVAN JARON**”. — Kiom da vortoj vi povas fari el la literoj en ĉi tiu saluto?

Ekzemple: felo, vana, floro. Vi povos uzi la literojn pli ol unufoje. — Sendu vian provon antaŭ la 10-a de februaro '50 al f-ino Booy, 96 Mansell Road, Birmingham, Anglujo.

2. (ĝis dujara lernado): Kiam infanoj estas tre junaj multe plaĉas al ili fari florĉenojn en la kampoj dum la printempo. Sed ĉu vi iam fabrikis vortĉenon en iu sezono? Provu! Komencu per iu ajn vorto laŭ via plaĉo kaj aldonu sinsekve aliajn vortojn, kiujn via menso sugestas, ĝis vi fine revenos al via unua vorto. Jen la ĉeno estas kompleta!

Ekz.: briko — domo — patrino — ktp.

Sendu viajn provojn antaŭ la 10-a de februaro al s-ro Moir, 44 Francis Street, Fulwell, Sunderland, Anglujo.

3. (por ĉiuj): Serĉu detalojn pri la vivo de Zamenhof, kaj rakontu ilin per viaj propraj vortoj.

Sendu vian provon antaŭ la 10-a de februaro al: Ges-roj Anwell, 1 Belle Grove West, Spital Tongues, Newcastle-on-Tyne 2, Anglujo.

**Konkursreguloj:** Skribu klare: 1. vian nomon; 2. vian naskiĝdaton; 3. dum kiom da tempo vi studis esperanton; 4. la nomon aŭ specon de via lernejo; 5. vian adreson. — Via instruisto aŭ unu el viaj gepatroj devas deklari, ke ĝi estas via propra (senhelpa) laboro.

**Premioj por Konkursoj:** Britoj povas ion elekti el la katalogo de la Brita Esperanto-Asocio ĝis la valoro de 2 ŝ. 6 p. por Konkurso I; ĝis la valoro de 3 ŝ. por Konkursoj II kaj III. Adreso: 140, Holland Park Avenue, London W II. En aliaj landoj la premio-gajnintoj devas elekti unu libron el jena listo: Konkurso I: „Esperanto por Infanoj” (Salomon), legolibro, aŭ „Komuna Kantlibro” (Holmes) kantoj kun muziko.

Konkurso II: „Tejo kaj Cerik” (Toms), historiotoj, aŭ „Johano kaj Silvio” (Betts) legolibro kun angla vortaro aŭ „Neĝulino” (Grimm) aŭ libro el Konkurso I-listo.

Konkurso III: „Kudlago, la malgranda Eskimo” (v. Hichtum), aŭ „Pinokjo” (Collodi) aŭ „La Nova Testamento” aŭ libro el la listoj por I kaj II.

Kiam vi scias, ke vi gajnis premion, skribu tuj al la brita Esperanto-Asocio kaj sciigu tion. Elektu la libron, kiun vi preferas.

**Grava malkovro!** (vidu la antaŭan n-ron de LJV).

Respondo: Cezaro ne povis skribi: „en la jaro LIV antaŭ Kristo”, ĉar li ne sciis, kiam Kristo naskiĝos.



**6-a Internacia Junular-Kunveno  
en Konstanz, Germanujo  
(28/7—4/8 1950)**

Adr. de la loka Organiza Komitato: Michel Schmidt, (17 b)  
Konstanz a. B., Grüngang 9

La aranĝado bonege progresas. La IJK okazos en bone ekipita liceo. La kongreskostoj (kiuj enhavas ĉion) ne superos 40 guld. En la februara n-ro aperos tabelo pri tio.

Kiuj jam anoncis sin al la L.O.K. en Konstanz ricevos apartan invitilon, aliĝilon kaj informilon.

**Ĉiu** partoprenonto ricevos **50 %-an** rabaton de la Germanaj Fervojoj.

**Ĉiu** eksterlanda partoprenonto ricevos la envojaĝpermeson. Post la aliĝo la L.O.K. informos **kie kaj kiam** oni petu la vizon por restado en Germanujo.

Post la aliĝo per la oficiala aliĝilo (kiu aperos en la februara n-ro de LJV) oni ricevos la kongreskarton kaj -insignon.

Sendante la aliĝilon oni pagu la duonon de la kostoj per nacia mono al la ĉefperanto de sia lando. (Francoj pagu al la Kongresoficejo de la UEA-Kongreso). La duan parton oni povas pagi ĉe la alveno, sed ekzistas ebleco pagi ankaŭ tiun sumon per nacia mono.

Estas pluraj eblecoj por resti pli longe en Germanujo. Pri tio

oni povas peti detalojn ĉe la Organiza Komitato kontraŭ unu respondkupono.

La programo estos treege alloga. I.a. okazos du tuttagaj ekskursoj per speciala ŝipo al Svislando (vizito el la Rejnakvofalego apud Schaffhausen) kaj al Aŭstrujo (vizito al la „Pfänder, apud Bregenz, per ŝnurvagonaro). Plue okazos Germana, Brita, Nederlanda kaj Aŭstra-Franca festvesperoj. (La grup(et)oj, kiuj intencas kaj kapablas prezenti ion en la kadro de tiuj vesperoj bonvolu jam kontakti la L.O.K.)

Geamikoj, la I.J.K. estos tre interesa! Ĝi havigos al vi tutan semajnon da ĝojo kaj frateco en Esperantujo!

Jam ŝparu, por ke vi baldaŭ povu aliĝi! Kaj — perfektigu vian Esperanton.

Aliaj gazetoj bonvolu represi.

### POSTMARKRUBRIKO.

Ĉi tiun monaton nur malgranda rikolto. Nia franca ĉefperanto bonvole sendis al ni 50 francajn pm., kiujn ni jam forsendis al Bergen op Zoom (Ned.). S-ro Rte Navarro sendis 90 hispanajn. Koran dankon, hispana amiko. Mi esperas, ke vi jam ricevis nian sendaĵon. De s-ro Togerez (Germanujo) ni ricevis kvanton da antaŭmilitaj poŝtmarkoj. Dankon.

Al ĉiuj poŝtmarkokolektantoj ni deziras feliĉan novjaron. Ankaŭ en 1950 ni ĉiam estos je via servo!

Libro-Servo, Edam.

### Rakonto de poŝtmarko.



Vere mi aspektas tre bela, ĉu ne? Nu, ankaŭ la pentristo ja sciis pri mia signifo kaj pro tio li diris al sia amiko Paŭlo: „Ĉi tiu poŝtmarko estu krono sur mia laboro. Ĝi tramigos la tutan mondon. Ĝi estas la Esperanto-poŝtmarko. Oni eldonis ĝin okaze de la aŭstria Esperanto-Kongreso. Kaj ĝi ĝojigos la tutmondan Esperantistaron.”

Kaj vere bela li kreis min.

Hieraŭ aĉetis min malgranda Petro. Li preskaŭ forgesis la naskiĝdaton de sia amiko Henk en Nederlando. Nun mi jam kuŝas en la sako kaj traveturos per fervojo la landojn. Jus mi transpasis Rejnjon kaj baldaŭ mi estos ĉe Henk en Rotterdam. Certe li ĝojos, kiam mi salutos lin, ĉar bela mi estas. Ĉu vi ne samopinias?

## T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino A. Kaagman, Voorhaven 80,  
Edam, Nederlando).



**Aŭstrujo:** S-ro Germela, la antaŭa ĉefperanto, transdonis sian taskon al: S-ro Alois Hilkersberger, Landeck/Tirol. Lötzweg 1, poŝtsparkonto 195356.

Ni multe dankas s-ron Germela pro lia akurata laboro, kiun li komencis post la milito, en tre malfavoraj cirkonstancoj.

Al la nova ĉefperanto ni deziras multan sukceson. Ni scias, ke s-ro Hilkersberger estas aktiva esperantisto, kiu jam multe laboris inter kaj por la junularo. Ni fidas, ke li faros ĉion, kio povos plifortigi lian sektion! Aŭstroj, helpu lin!

### La Celoj de T.J.O.

Kiom ofte ni, la anoj kaj subtenantoj de TJO, pensas pri la celoj de nia organizo? Kaj (kio estas eĉ pli grava) kion ni povas fari por antaŭenigi kaj efektivigi tiujn celojn?

Ekzemple ni pensu momenton pri nur unu celo: „Konsciigi la junularon pri tutmonda interfrateco kaj akceli ĝin per la aranĝado de internaciaj renkontiĝoj.”

En 1949 nia franca ĉefperanto, helpata de bonkoraj esperantistoj en Versajlo, multe laboris por efektivigi tiun celon, aranĝante la fian Internacian Kunvenon. Momente Schmidt, nia juna, agema „longkrurulo” en Germanujo multe faras por organizi la venontan I.J.K. en Konstanz. Tio estas bonega laboro sed ĝi ne sufiĉas. Mi opinias, ke ni ĉiuj povas kaj — se ni volas antaŭenigi nian organizon — eĉ devas fari ion por efektivigi la interfratiĝon de la junularo.

Mi proponas, ke ĉiu ano aŭ subtenanto, kiu povas akcepti en 1950 du, tri (aŭ pli) eksterlandajn gastojn, tuj informu la redaktorinon de LJV pri tio, por ke ŝi enpresigu la adresojn en nia gazeto.

Necesas, ke ĉiu precize skribu, kiom da junuloj ili povas akcepti kaj ĉu knaboj aŭ knabinoj aŭ ambaŭ.

Dum mia multjara laboro en la Skolta Movado mi konvinkigis pri la alta valoro de la malgrandaj grupkunvenoj, kie oni vivas kiel vere feliĉa familio. Mi ne multe ŝatis la grandajn ĵamboreojn, en kiuj mankas la facila interkomprenilo Esperanto.

Mi mem pretas akcepti en nia distrikto 12-15 eksterlandajn gejunulojn sub la aĝo de 20 jaroj. Estas dezirinde, ke ĉiu sufiĉe bone parolu Esperanton. La restadkostoj estos nur por la manĝaĵoj kaj ekskursoj, ĉar mi certe trovos bonvolajn geamikojn en mia vilaĝo. Mi loĝas en unu el la plej belaj partoj de Anglujo: sur la famaj Cotswold Montetaro.

Geamikoj, mi petas vin, ke vi skribu tuj pri ĉi tiu grava afero. Ni laboru, por ke TJO estu ne nur Organizo, sed ankaŭ Movado por la interfratiĝo de la tutmonda junularo!

L. Symes, Quains, Minchinhampton, Britujo.



**Internaciaj rotoj:** Skollfrato Johano Texier ricevis leterojn de TJO-anoj, en kiuj ili demandas, kiom oni pagu por aliĝi al internacia roto. Oni pagas neniu kotizon. Ekzistas nur la korespondelspezoj. La aliĝo al internacia roto estas senpaga.

Nun ekzistas du internaciaj rotoj, kiuj korespondas per Esperanto. Se la intereso daŭros, pluraj ekzistos antaŭ la someraj kongresoj.

**Pariza kongreso:** Okaze de la Internacia Kongreso oni aranĝos skoltan ekskurson aŭ tendaron, se sufiĉe da skoltoj interesiĝos. Ankaŭ skoltoj, kiuj deziras viziti la urbon, povos fari tion en skoltaj grupoj. Oni anoncu sin ĉe s-ro Jean Texier, 278 Av. Daumesnil, Paris (12), Francujo.

**Norvegujo:** Oni kalkulis, ke proksimume 4.000 roverskoltoj el tridek landoj partoprenis la Rover-Moot (internacia kunveno de roverskoltoj) en Sjak en aŭg. '49. La tendara fajro, kiu okazis apud la rivero Otta, estis sukcesplena. La roverskoltoj prezentis la vivadon en siaj diversaj landoj.

Zigzaganta Hipopotamo.

## RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**Esperanto-telefon-nomlisto**, samtempe propagandilo por Esperanto-kurso, eld. de „Nederlanda Katoliko” en Eindhoven, Ned. Prezo po 0,10 guld.; 5 ekz.: 0,25 guld.

**Jurlibro U.E.A., 2-a parto 1949**, kun Marista Terminaro. Liverata nur al Individuaj membroj de U.E.A. (Heronsgate, Rickmansworth, Herts, Anglujo).

**La konsumkoopero kaj la ekonomia vivo de Svedujo**, verk. de Thorsten Odhe (direktoro de la int. koopera Alianco) kaj trad. de St. Engholm.

Bele ilustrita broŝuro, donanta resumon pri la historia evoluo de la sveda konsumkoopero. Oni senpage povas peti ĝin al „Kooperativa Federacio”, Stockholm 15, Svedujo.

## GENERALAJ INFORMOJ.

De la 21-a de januaro ĝis la 1-a de februaro 1950 okazos en la „Nederlanda Muzeo por Instruado kaj Edukado”, Prinsengracht 151, Amsterdam, la Internacia ekspozicio de infandeseĝnaĵoj, kiu havis tiom da sukceso en Francujo kaj Italio. Krom deseĝnaĵoj estos montrataj interesaj ekzemploj de interdejnaj korespondado. Oni povos vidi tie ankaŭ lernejan presileton.

La Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado”, la „Nederlanda Centro de Instruado kaj Edukado” kaj la „Nederlanda grupo de Instruistoj-Esperantistoj”, kiuj organizas la ekspozicion, atendas multajn vizitantojn.

**Germana Esperanto-Kongreso** okazos en Mainz, de la 27-a de majo ĝis la 2-a de junio 1950. Oni petu informojn kaj aliĝilojn al la Kongreskomitato (21b), Mainz, Boppstr. 9.

**Aŭstria Esperanto-Kongreso**, okazos en 1950 en Wien de la 27-a ĝis la 30-a de majo. Eksterlandanoj ne pagos kongreskotizon. Oni petu informojn al la loka Kongresa Komitato, Wien I, Neutorgasse 9.

**Tutmonda Adresaro de la Esperantistoj** (TAE) aperos la 17-an de aprilo 1950. Limdato por ensendoj: 15-a de marto. Petu informojn al la eldonejo: Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Batthyanystrasse, Aŭstrujo.



## KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Anglujo:** F-ino D. Owen, 14 Woodland Drive, Watford, Herts, serĉas por siaj 16-j. lernantoj 6 francajn knabinojn, k. 3 svisajn knabojn, por kor.

Membraro de dimanĉlernejo dez. kor. (angle aŭ esperante) kun dimanĉlernejoj en ĉ.l. Skribu al s-ro E. Revill, 13 Highbank Dve, Manchester 20.

**Bulgarujo:** Marin W. Koev, Ĉumerna 6, Kazanlik, dez. kor. kaj interŝ. il. poŝtk., gazetojn, literaturaĵojn. Respondo certa.

**Ĉeĥoslovakujo:** Jaroslav Matula, Juhlava, poŝt. schrán. 40, dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo. Interŝanĝas poŝtm. kaj poŝtk.

Oldrich Uhlir, Zakrany ĉ. 231, p. Zbyšov u Brna, deziras korespondi.

40 gelernantoj, 13-15-j. urĝe dez. kor. kun samaĝuloj en la tuta mondo. Resp. certa. Skribu al: Antonín Kautvol, Mladá Boleslav II/672.

Lida Komzáková, Lomená str. n-ro 2014, Tábor, 23-j. SEL-agento, (skoltinoj) dez. kor. kun la tuta mondo. Skribu ankaŭ por grup-anoj.

**Germanujo:** 21-j. komerca oficisto dez. kor. kun ĉiuj landoj, per let. aŭ il. poŝtk., p.ĉ.t. Willy Pluhm, (22b) Mühlheim/Koblenz, Bachstr. 7.

**Hispanujo:** R. Sorolla, str. Torrente vidalet, 13, 1<sup>o</sup>-1<sup>a</sup>, Barcelona (G), dez. interŝ. pm. k. ĉ. l. Resp. certa, se estas per rekomendita letero.

20-jara Bankoficisto Vicente Rodrigo, San Vicente 15, Castellon, serĉas gekorespondantojn.

Albino Navarro Pla., Plaza del Rey 22, Castellón, dez. kor. pri pm.

**Hungarujo:** Rudolf Brány (15-j.). Budapest VI, Paulay Ede u. II. III. 43, dez. kor. kun geknaboj.

Ferenc Bogisich, Budapest III, Urömi u. 39, (15-j.) dez. kor. kun geknaboj.

**Nederlando:** Felix H. Kat (21-j. junulo) dez. interŝ. poŝtmarkojn kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Adr.: Spoorstr. 142, Leeuwarden.

45 knaboj, kiuj vizitas la teknikan mezgradan lernejon „Technicum” (dir. ing. B. B. de Regt c.i.), Eendrachtsweg 26-27, Rotterdam, volontege korespondos kun francaj knabinoj, 13-17-jaraj.

**Nov-Zelando:** Tri 13-j. knabinoj dez. kor. kun nederlandaj knab(in)oj, prefere per bele afrank. il. poŝtk.: Ann Fawcett, 17 Mt. Royal Ave., Mt. Albert Auckland; Valerie Flood, 37 Beaconsfield St., Grey Lynn, Auckland W 2; Betty Curin, 83 Dignan St., Pt. Chevalier, Auckland W. 3.

**Polujo:** Henryk Dabrowski, 18-j. studento en Industria liceo, Jawor-D. Śl., Wroclawska 29, dez. kor. kun studentinoj (ne el Ĉeĥosl., Maroko, Bulgarujo).